# Amerika Esperantisto

DECEMBER, 1915

# AMERIKA ESPERANTISTO

**Official Organ**
**of**
**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.**

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto

**Editor**

Dr. C. H. FESSENDEN, Newton Centre, Mass.

**Assistant Editor**

I. A. McCaffrey, West Newton, Mass.

**Advisory Board**

J. D. Hailman, Pres., E. A. N. A.

Judge W. R. Daingerfield
Ernest F. Dow
Dr. D. O. S. Lowell
D. E. Parrish
Herbert M. Scott
Dr. B. K. Simonek
Lehman Wendell


## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor. Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.
Berkeley Esperanto-Rondo, Berkeley H. S.
A. S. Vinzent, Sec'y, 2429a Ellsworth St.,
Meets every Monday, 8.00 P. M.

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq.
Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

BUTTE, MONT.
Arĝentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P.M. C. L. Williams, Sek., 251 Curtis st.

CHICAGO, ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park
Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.
La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.
F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek.
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

CINCINNATI, OHIO.
Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street.
A. F. McKinney, Sec. L. B. Harrison Hotel.

DELPHOS, OHIO.
Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday, 7.30 P. M., A. J. Laudick, Secy.

CLEVELAND, OHIO.
La Zamenhofa Klubo.
F-ino L. B. Weber, Sek., 2036 W. 48th St.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody, daily 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8-10 P. M.
La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner, Sek. 632 Summit ave., 2nd Mondays, 8 P.M.

NEW YORK (Bronx) N. Y.
Bronx Esperanto Society, Morris H. S.
C. C. Coigne, Sec'y, 243 Bedford Pk. Blvd.

PHILADELPHIA, PA.
Phila. Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 4212 Girard ave. Meets 4th Fri. Windsor Cafe, 1217 Filbert st.

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art
Wm. Smith, Sec., 1607 Chislett street.
Fridays, 8 P. M.,Teachers' Rm., Carnegie Inst.

PORTLAND, ME.
Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg.,
Herbert Harris, Sec'y, 10 Henry St.

ROCKFORD, ILLS.
Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St.
Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmele St.

SALT LAKE CITY, UTAH.
Salt Lake Esperanto Club,
Mrs. F. M. McHugh, Sec., 4002 So. State St.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm. 127, Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

TILDEN, NEBR.
Esperanto-Fako de la Nebraska Ŝtata Kristana Celada Unuiĝo,
Estro, Pastro Chas. P. Lang, Tilden, Nebr.

WASHINGTON, D. C.
Kolumbia Esperanta Klubo, 2014 F st., N. W.
1an & 3an mardon, ĉiumonate, A. Mayer, Sek.

WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society
Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande $1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novajoj ĉiam prefere akceptitaj. **Oni ne resendas** neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 18 DECEMBER, 1915 NO. 2

## EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Nun fermiĝas alia jaro, kaj malantaŭen rigardante ni pripensas kun ĝojo kaj malĝojo, la aferojn okazintajn. La terura milito en Eŭropo ankoraŭ daŭras,—okazo por maldolĉa malĝojo; sed tie la Esperanta Spirito pli multe evidentiĝas, pro kiu ni kuraĝiĝas. Dum la 1915a jaro la Esperanta Afero notindas pro la praktika rolo kiun ĝi ludis en internaciaj rilatoj. La Universala Esperanto-Asocio konstante montris tiun flankon de nia movado. El ĝia Centra Oficejo en Genevo, venis dum la jaro leteroj, pakajoj, kaj ĉiaj komunikajoj, pli multe ol miliono, serĉantaj la perditajn, transsendantaj monon kaj helpantaj dum la terura epoko, ĉiamaniere. La komunikado kun ĉiu lando, estas facila pro la internacia lingvo.

Dum 1915a ankaŭ ni trovas la duonoficialan rekonadon de Esperanto de Germanujo. La "flavaj bultenoj" eldonitaj jam estas famaj kaj bonkonataj. Tiam komenciĝis la eldono de la "Internacia Bulteno", la oficiala, ilustrita gazeto, prezentante la Germanan flankon de la konflikto.

La Ruĝa Kruco kaj Esperanto naturе sin intermiksas, kaj ni trovas sur la batalkampoj, kelkajn Ruĝkrucajn Ambulancojn, kun doktoroj kaj flegistinoj kiuj parolas la internacian lingvon.

Ĉe hejme, nia laboro estas senĉesa. La Universala Kongreso en San Francisko estis sukcesplena dank' al la penado; de la loka Komitato kaj la helpo etendita de la Estroj de la Panama-Pacifika Ekspozicio; niaj komitatoj laboras por la diversaj bezonoj de la nacia Asocio; la Garantia Kapitalo, necesajo dum multaj jaroj, efektiviĝas; la nombro da lojalaj subtenantoj kaj anoj en E.A.N.A. pligrandiĝas; kaj nur restas ke dum la venonta jaro ni tenu la sukceson kaj lokon gajnitaj de ni. Ni ĉiuj bezonas la kuraĝilon de komuna laborado; ni ĉiuj devas ekscii tion kion nia najbaro faras por la Afero, por ke ni ankaŭ daŭru nian fortan propagandadon. Tial ni decidas subteni pli multe ol iam antaŭe, la oficialan gazeton en Usono, **Amerika Esperantisto;** ni helpos ĝin per sugestioj; ni priparolas ĝin al niaj Esperantaj

amikoj kiuj ankoraŭ ne abonis ; ni individue faros la decidon ke per nia propra subtenado ĝi fariĝos la plej grava internacia kaj nacia gazeto en Esperantujo. Ni havas la povon—restas kun vi! Farante viajn Novjarajn Rezoluciojn, ne forgesu enmeti kelkajn rilate al nia Afero en Usono!

Etendante al ĉiu leganto de **Amerika Esperantisto** la plej korajn dezirojn por prospera 1916a, oni sin turnas al nova jaro, mirante pri kio ĝi entenas por ni.

## PRESS CLIPPINGS

**Washington, D. C.** In the "Washington Courier", a new national weekly magazine, issue of Nov. 20, appears an exceedingly interesting article on "The International Language." This is to be followed up by the publication of a course of lessons, under the direction of Dr. Ivy Kellerman-Reed. Our readers who may be interested in obtaining copies of the "Courier", note advertisement in this issue.

**Beloit, Kans.** In the "Daily Call" (Nov. 13) a short article by W. L. Collins of Asherville, member of the State Propaganda Committee, adds the name of **Amerika Esperantisto** and address, from which further information may be obtained.

**Marlin, Texas.** Dr. J. W. Torbett, the newly elected Councilor for the Southwestern Division, has already shown that he "does things". An avalanche of inquiries from the state of Texas, was the result of articles over the signature of Dr. Torbett appearing in the Dallas & Galveston News. The Marlin Democrat and in the Waco Morning News. Here also the thoughtful propagandist added the address of **Amerika Esperantisto,** making it possible for us to refer a long list of names back to Councilor Torbett for personal follow-up. Many of us would do well to catch the spirit of enthusiasm and accomplishment manifested by Dr. Torbett.

**Bayonne, N. J.** "The Advance Sheet", a magazine of Religious and Political Advancement, is conducting a series of articles on "Esperanto Shorthand."

## KRONIKO NORDAMERIKA

**Chicago, Ill.** S-ro Herbert Harris, instruas al nova kurso, en kiu ĉiu ano estas kolegia gradiĝinto. Jam sep estas ricevitaj kiel anoj de la nacia Asocio. Oni ĉiam certiĝas pri Esperanta entuziasmo kaj agemeco kie ajn troviĝas S-ro Harris.

**Norfolk, Nebr.** La ŝtata Kristancelada Unuiĝo kunvenas ĉi tie por la ŝtata kunveno, Nov. 11an-14an. La lokaj Esperantistoj en Nebraska, sub la gvido de Pastro C. P. Lang, kondukis Esperantan ekspozicion, kiu eltiris la intereson de multegaj scivolemuloj. Ĉe la Diservo ĉeestis 128 personoj. Unue estis parolado pri la Deveno kaj Historio de Esperanto; due, ĝia rilato al la mondo kaj speciale al religio; trie, klarigo pri la gramatiko, ktp., kaj kvare la Diservo laŭ la programo. Nia korespondanto skribas ke ĉiu korekantis la Esperantajn himnojn, juna kaj maljuna, profesoroj kaj lernejinfanoj. Ankaŭ ĉeestis la Diservon, Sekretario de la Kristan-Celada Unuiĝo, S-ro Shaw el Bostono.

**Detroit, Mich.** La Pola Esperanto-Asocio anoncas sian novan oficistaron kiel jene: Prez., S-ro St. Hatt; Vic-Prez., A. Dzierzak; Financa Sekretario, L. Skavinski; Protokola Sekretario, A. Hermann; Financa Kasisto, B. Lendo; Bibliotekisto, L. Hatt; Instruisto, L. Polakovski. Oni kunvenas ĉiusemajne, lunde kaj jaŭde. La lecionoj estas—pole, angle, kaj esperante,—senpagaj.

**Annapolis, Md.** La ĉiujara kunveno de la Maryland Esperanto-Asocio okazis ĉi tie. Multaj planoj por plua

laborado estas faritaj. La propono de Pastro J. L. Smiley, Konsilanto, labori por la enmetado de Esperanto en la Usonan Ŝipan Akademion, kaj en la Militan Akademion estis adoptita kiel rezolucio. Oni elektis la jenan oficistaron: Prez., Pastro Smiley; Sek., F-ino E. W. Weems (Baltimore); Helpa Sek., F-ino E. M. Smith; Kas., S-ro W. H Wilhelm; Aga Komitato, la oficistoj kaj S-ino G. W. Moss, S-ino Hodges kaj F-ino Hodges; D-ro Kerr estas elektita kiel Vic-Prezidanto por la Graflando Baltimore.

---

## WORLD GLEANINGS

**Great Britain.** One of London's woman interpreters, employed by the London General Omnibus Co., shows by the two little flags and green star on the sleeve of her uniform, that she speaks French, Flemish and Esperanto.

**Portugal.** The "Verda Stelo" group in Tunsala (Madeira) has now over 100 members and conducts two classes for new students.

**Servia.** An Esperanto class for prisoners of war has been started in Uprija by Engineer L. Berger.

**Persia.** An Esperanto text-book in the Persian language has been compiled and is ready for printing at Teheran, when the Esperanto letters are obtainable.

**Norway.** An Esperanto course has been opened among the students of the military school in Trondhjem. Twenty-three students and one sub-officer are already enrolled.

**Japan.** The local society in Jokoska recently arranged a welcome reception for one of their members, S. Ĉasaj, lieutenant in the navy, who has just returned from Australia. In speaking of his voyage, Ĉasaj was particularly enthusiastic about the warm reception tendered him by the Esperantists of Melbourne.

**Catalonia.** The 6th Congress of the Catalonian Esperanto Federation is declared to be a great success. It was held in the charming little village of Villanova, and under the direction of an active local committee, the arrangements for the reception of the many guests from other towns were excellent. In connection with the Congress an Esperanto exposition was conducted, at which Ed. Kuhnl, the well-known Bohemian Esperantist was the principal speaker.

**Holland.** The Committee at The Hague which is seeking to give instruction to all soldiers who desire to take advantage of the opportunities, have included the subject of Esperanto in their list. A new course which has resulted, consists of 20 members, meeting in one of the local schools. The Hague Esperanto Propaganda Committee recently met for business and social purposes. About 120 members were present. An Abstinence Esperanto Society has been organized in Rotterdam, its object being to promote the propaganda of Esperanto among the believers in total abstinence, and the use of Esperanto for the benefit of the total abstinence movement. A public lecture in Wormerveer, on "The Utility of Esperanto" resulted in the formation of a new class, to be conducted under the auspices of the local Esperantists.

---

## LA NOVA PROPAGANDILO

Ni petas favoran atenton por la anonco pri la nova svedlingva propagandfolio. Ĝi celas la bonon de nia afero; ke la internacia helplingvo estu pli kaj pli konata, uzata kaj ŝatata en nia lando.

La metodoj por dissemi propagandilojn estas multaj. Kompreneble oni povas disdoni ilin al konataj kaj nekonataj personoj. Oni ankaŭ povas "forgesi" ilin en fervojaj vagonaroj kaj atendejoj, sur pasaĝerŝipoj kaj kafejaj tabloj. Oni povas meti foliojn en forsendotaj leteroj, kaj, se

oni estas negocisto, oni povas donaci ilin al klientoj. Utile estas ĉiam porti en la poŝo kelkon da folioj, por liveri al personoj, kiuj ĉe interparolado aŭdigas iom da intereso, aŭ kiuj demandas la signifon de la verda stelo, kiu sidas en nia butontruo.

Nia bela, praktike utila, facila, benata helplingvo meritas esti konata en vastaj rondoj. Kaj la laboro ne estos sen rezultato, kvankam ofte povas ŝajni tiel. Propagandante Esperanton inter samlandanoj, ni plenumas devon al niaj fremdlandaj samideanoj, kiuj siaflanke klopodas kaj sukcesas fari la helplingvon uzebla ĝuste al ni por pli kaj pli multaj rilatoj inter Svedujo kaj aliaj landoj.

Se el dek semoj nur unu ĝermos pli malpli baldaŭ, ni ne malsukcesas.

—El "La Espero" (Svedujo).

---

## THE TREASURER'S REPORT

The financial statement of the 11th Universal Congress Committee is printed herewith, as we believe all will be interested in noting the excellent management of the late Congress.—Ed.

CREDIT

| | |
|---|---|
| Dinners | $157.25 |
| Guidebook | 107.50 |
| Badges | 116.40 |
| Postal cards | 49.00 |
| Printing | 149.50 |
| Mt. Tamalpais tickets | 165.00 |
| Exposition tickets | 80.00 |
| Decorations | 32.75 |
| Printing press | 60.00 |
| Reservations | 55.00 |
| German house entertainment | 19.75 |
| Various expenses | 58.33 |
| Miss I. A. McCaffrey | 20.00 |
| Mr. Robert Colquhoun | 38.25 |
| Premiums | 35.00 |
| Propagandiloj | 30.88 |
| Express | 6.52 |
| Chinatown trip | 10.85 |
| Telegrams | 6.70 |
| Postage | 25.15 |
| 1 Loss | 15.20 |
| Congress book | 28.90 |
| Mileage | 25.60 |
| Exposition refund | 2.00 |
| Guarantor refund | 255.56 |
| 100 Congress edition Amerika Esperantisto | 5.00 |
| Total | 1556.09 |
| 2 Cash on hand | 12.37 |
| | 1568.46 |

Attest:—

Albert Norris,
Chairman.

D. E. Parrish,
Secretary.

San Francisco, California.
November 4, 1915.

DEBIT

| | |
|---|---|
| Congress cards | $435.00 |
| Help Congress cards | 181.37 |
| Reservations | 30.00 |
| Guarantee fund | 384.00 |
| Gifts | 41.40 |
| Congress stamps | 8.16 |
| Postal cards | 34.70 |
| Guide book | 57.50 |
| Dinners | 139.25 |
| Exposition tickets | 48.40 |
| Premiums | 6.88 |
| Printing press (cash) | 36.00 |
| " " (notes) | 15.00 |
| Mt. Tamalpais tickets | 56.10 |
| Notes | 53.15 |
| 3 Various | 41.55 |
| Total | 1568.46 |

1 Checks returned N. S. F., exchange, etc.
2 Turned over to the Kalifornia Esperantista Rondaro.
3 Money received from sales of flags, books, etc., during Congress.

I, A. S. Vinzent, hereby certify that the above is a true and correct statement of the monies received and disbursed from February 4, 1914, to date.

A. S. Vinzent,
Treasurer XI Universala Kongreso de Esperanto; VIII Kongreso de E. A. N. A.

## PRAKTIKA UZADO DE ESPERANTO

La sekvanta letero eldonita de la Emerson Piano Kio., Bostono, estis sendita po 35,000 ekzempleroj al fortepianoj-vendistoj ĉie en la mondo, ekstere de la militregiono.,

Boston, Okt. 1an, 1915.

Kara Sinjoro:—

Kompreneble ni deziras pligrandigi la vendadon de niaj fortepianoj, grandaj, vertikalaj, kaj aŭtomataj, en fremdaj landoj kie cirkonstancoj ebligas tion.

Ni tial komunikiĝas kun vi, ĉar ni estas informataj ke vi interesiĝas en la arto muzika, kaj eble vi povos afable konsili nin pri tio, kio estus eble en via urbo, eĉ se vi mem ne volus agi.

La pianoj "Emerson" estis unue prezentataj al la mondo muzika dum la jaro 1849, kaj de tiam ilia reputacio konstante pligrandiĝas ĝis nun, kiam oni konsideras ilin modeloj de bonegeco en ĉiuj detaloj, kaj ilia reputacio estas universale komprenata.

La nomo "Emerson" fandita bareliefe sur la metala plato de ĉiuj fortepianoj "Emerson" signifas honestan penon science kaj persiste uzatan por atingi perfektecon.

Ni multe bedaŭras ke ni ne havas katalogon en lingvo alia ol angla, sed, por ke vi ricevu ĝeneralan ideon pri la modeloj kiujn ni estas nun fabrikantaj, kaj ankaŭ pri nia fabrikejo, ni permesas al ni sendi al vi nian katalogon.

Estos plezuro por ni ricevi leterojn kaj ni ĝoje respondos al ĉiuj viaj demandoj.

Ni prezentas al vi nian respektan saluton.

Emerson Piano Co.,
Edward S. Payson.

---

## LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN DE LA MONDO

La plej efika propagando de nia kara afero ne estas la varbo de entuziasmuloj en ĉiu lando; ne estas la kunvenoj—semajnon post semajno—de grupetoj aŭ grupegoj, kiuj bone komprenas la superecon, kiun posedas komuna lingvo inter diversaj popoloj; ne estas la interŝanĝo de Esperantaj leteroj inter eksterlanduloj; ne estas la eldonado de ĉiam pliiĝanta Esperanta literaturo, per flugfolietoj, jurnaloj, gazetoj aŭ libroj—ĉu originale verkitaj aŭ tradukitaj el la mondliteraturo; ne estas eĉ tiu gravega, dezirinda, avide atendata afero—Internacia Esperanta Kongreso. Ĉiuj la antaŭdiritaj peroj estas valoraj, gravaj, neforigeblaj, necesegaj; sed, laŭ mia opinio, ekzistas alia pli valora, pli grava, pli dezirinda, tute necesa metodo por disvastigi la sciadon de nia lingvo al la plej malproksimaj anguloj de la mondo: tio estas—La Enkonduko de Esperanto, kiel serioza studajo, en la lernejojn de ĉiu lando.

Ni ĉiuj konfesas ke la sciado de la tabelo de multobligado estas nepre necesa por iu ajn edukita persono. Sed kiel estas tia sciado akirota? Ĉu propagandistoj devas iri de urbo al urbo, montrante per paroloj kaj elmontradoj ke ĉiu, kiu lernos tiujn tabelojn, havos grandan superecon super tiuj kiuj ne lernos ilin? Tiaokaze, eble certaj studemaj, aŭ ambiciaj, aŭ supersaĝaj plenkreskuloj studus kaj lernus ke sesoble sep estas kvardek du, aŭ naŭoble kvar estas tridek ses, sed se tia metodo estus provita dum nia juneco—jes, eĉ inter ni,—kaj ni ne estus devigitaj ellerni la tabelojn, ne duono el ni Esperantistoj hodiaŭ povus solvi problemon enhavantan multobligadon.

Ĉu vi dubas tion? Ĉu vi kredas ke eĉ vi, kiuj estas pli inteligentaj ol la plimulto de la homaro—ĉar vi studas, kaj almenaŭ iamezure scias, Esperanton—ĉu vi kredas ke vi lernus la multobligadon se nur iu estus dirinta al vi ke ĝi estas grava, dezirinda aŭ eĉ necesega? Ne, ne! tute ne! Vi jam lernis ĝin nur ĉar vi estis devigataj fari tion en la lernejo, kie oni devas instrui pri ĉia dezirinda studajo.

Mi pruvos tion, kion mi jus diris,

vi mem estantaj la atestantoj. Ĉu vi iam aŭdis ke same kiel la lernado de la tabelo de multobligado ĝis dekduoble dekdu estas utila, ĝuste tiel la lernado ĝis dudekkvinoble dudekkvin estas ankaŭ utila? Kaj ĉar vi aŭdis ĝin kaj kredis, ĉu vi povas rakonti la tutan tabelon parkere? Ĉu vi povas ekdiri kiom estas deksepoble dudektri, aŭ deknaŭoble dekok? Ne! ĉar via lernigado ĉesis je dekduoble dekdu, vi ankaŭ ĉesis, kaj vi havas nur la lernejon danki por ke vi ne estas tute nesciulo.

Estas nedubebla fakto ke la meze bona menso ne multe deziras la sciadon; kaj estas la devo de niaj lernejoj gvidi la kreskantajn animojn—ĉu ili volas, nevolas, aŭ malvolas—tiel ke plenkreskinte ili havu la kiel eble plej utilan sciadon.

Ni Esperantistoj sincere kredas ke nia lingvo estas tre dezirinda por ĉiu persono tra la civilizita mondo. Kiu, do, estas la plej taŭga tempo kaj loko por doni instruadon pri ĝi?

**La plej taŭga loko estas**—la lernejoj tra la mondo.

**La plej taŭga tempo estas—antaŭ ol la lernanto studis alian lingvon krom sia propra.**

Mallonge mi donos miajn argumentojn.

1. Esperanto estas simpla kaj facile lernebla.

Nenia argumento ŝajnas necesa rilate al tiu ĉi punkto por konvinki Esperantistojn. Tial, mi donos nur unu fakton. Ĉiujare, dum dek jaroj, mi donis ne-devigajn Esperantajn lecionojn al kiuj ajn el miaj studentoj deziras studi almenaŭ unu periodon dum la semajno, post la aliaj studentoj foriris. Miaj klasoj variiĝis de tri ĝis kvardek, laŭ cirkonstancoj; sed ĉiam ili entenis entuziasmulojn, kaj iafoje preskaŭ spertulojn. Post unu jaro de tiaj laŭvolaj lecionoj, ĉiu studento povis legi Esperanton pli bone ol iun ajn lingvon en la deviga studado de kiu li pasis du-trifoje tiom da tempo.

2. Kvankam Esperanto estas simpla kaj alloga, ĝi estas tre utila:

a. Kiel mensa disciplino.

Multaj studajoj ne estas valoraj kiel praktikaj aferoj, sed nur kiel iloj kiuj fortigas kaj akrigas la mensajn povojn. Esperanto estas vera mensa fortigilo kaj akrigilo. Ĝi lernigas la studenton observi la verajn interrilatojn kiuj ekzistas inter la diversaj parolpartoj, kaj elekti la taŭgajn vortojn per kiuj li bezonas esprimi siajn dezirojn; sed ĝi ne estas sufiĉe malfacila por malkuraĝigi lin. Iu saĝulo estas dirinta: Oni povos konduki iun al kia ajn altaĵo, se nur oni faros la diversajn ŝtupojn sufiĉe malaltaj. Nu, Esperanto estas tia ŝtuparo. La studento povas supreniri senpene, kvazaŭ li marŝadas sur ebenaĵo; sed fine li trovos sin sur monto de akiro, ĉar lia forto ĉiam fortiĝas, kaj li konstante suprenrampas nesciante.

b. Esperanto estas lingvajilo: pero.

La uzado de Esperanto, facila lingvo, faras la uzadon de iu ajn lingvo pli facila ankaŭ. Tio estas vera pedagogio, laŭ la regulo jus konstatita pri la ŝtuparo kun la malaltaj ŝtupoj. Tial Esperanto estas valora pero, per kiu lerni ĉu Latinan, ĉu Francan, Germanan, Hispanan aŭ alian lingvon.

Mi rememoras la titolon de unika libro — Latina (Lingvo) sen Larmoj. La konkludo estas facile komprenebla; sed rilate al Esperanto mi povas diri — ĝi mem estas ne nur ĉiam sen larmoj, sed, ke ĝi estas mirinda pero, per kiu oni povas transiri, kiel per ponto, de la patra lingvo al iu ajn alia.

c. Fine, Esperanto estas utila, ne nur kiel nepraktika disciplino, nek kiel simpla pero, sed kiel vera, grava, plejvalora celo — celo per si mem. Ni nur atendas la tempon kiam ĉiu lernejo tra nia edukita mondo agreos enkonduki Esperanton kiel devigan studajon: tiam la lernantoj de Ruslando aŭ Hindujo povos paroli kun la ĥino, aŭ la Germano kun la Finno. Ĉu tiu tago estas tre malproksima? Ni esperu ke ne. Dume, ni Esperantistoj havas devojn antaŭ ni — varbi la nekredemulojn. Laŭ niaj povoj kaj laŭ niaj cirkonstancoj, ĉiu en sia lando aŭ urbo, ni laboru, klopodu, baraktu, semante laŭlonge de ĉiaj akvoj, kaj iomete alifrazante la vortojn de nia kara Majstro, kvankam

> Cent semoj perdiĝos, mil semoj perdiĝos —
> Ni semu kaj semu konstante.

D-ro D. O. S. Lowell,
Estro, Roxbury Latin School,
Boston, Mass.

## FOR THE BEGINNER

### Edited by Herbert M. Scott

Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.

**Some Noteworthy Passages from the Ekzercaro:**

1. Father is well.
2. The child has stopped crying.
3. Of all animals don't offer your hand to a lion.
4. A lion is dangerous company.
5. Come along with father.
6. Lewis, give me some bread.
7. Birds fly.
8. Alexander won't learn, and so I am giving Alexander a whipping.
9. I hope you'll have a good time!
10. In the sky stands the beautiful sun.
11. Your bread is not as fresh as mine.
12. Among all his brothers Anthony has the least sense.
13. A certain widow had two daughters.
14. The youngest daughter was the very image of her father.
15. What is the date today?
16. I ask you to make me another loan some time again, when I need money.
17. The five of them fell upon me, but I beat off all five assailants.
18. There came to her a poor woman who asked her for a drink.
19. "With pleasure, my good (woman)."
20. The child is crying because it wants something to eat.
21. Her mother scolded her for taking so long at the spring.
22. "What's this!"
23. How does this come?
24. Wouldn't you like to have the same gift.

**Kelkaj notindaj eroj el la Ekzercaro:**

**La** patro estas sana.
La infano **jam ne** ploras.
Al leono ne donu la manon.
(What would be the normal word order?)
Resti kun leono estas danĝere.
Venu **kune kun** la patro.
Ludoviko, donu al mi panon.
("Some" and "any" in a quantitative sense are often unrendered.)
**La** birdoj flugas.
Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron.
Ĝojan feston! (mi deziras al vi).
**Sur** la ĉielo staras la bela suno.
(Apropos of the preposition cp. the Hebrew notion of a **firmament** dividing the waters.)
Via pano estas malpli freŝa, ol mia.
El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.
**Unu** vidvino havis du filinojn.
La pli juna filino estis la plena portreto de sia patro.
Kiun daton ni havas hodiaŭ?
Mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonas monon.
Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.
Venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ke ŝi donu al ŝi trinki.
"Tre volonte, mia bona."
La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi.
Sia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto.
"Kion mi vidas!"
De kio tio ĉi venas?
Ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon?

---

Prezidanto Wilson, laŭdire estas sprita viro. Dum viva interparolado amiko rimarkis ke liaj okulvitroj estas ĉe la pinto de la prezidanta nazo.

"Viaj okulvitroj, S-ro Wilson, estas preskaŭ sur via buŝo."

"Bonege" estis la rapida respondo, "Ili sendube volas vidi pri kio mi parolas."

—Trad. A. W. Lansing.

## OFFICIAL COMMUNICATIONS

## THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

### Central Office, Newton Centre, Mass. C. H. Fessenden, Sec.

President
J. D. HAILMAN
310 So. Lang Ave.
Pittsburgh, Pa

Secretary-Treasurer
DR. C. H. FESSENDEN
Newton Centre, Mass.

### Our Guarantee Fund

The "opening gun" of the campaign was fired from headquarters in the shape of the circular mentioned in the November number. The responses to this have been most encouraging, and many of our old friends who through neglect or otherwise had not been identified with the Central Office during the past three or four years, have manifested their continued interest by a renewal of their membership in the Association. We can justly attribute success to the work.

However, we note there is evidently some misunderstanding with regard to the manner of payment of the Guarantee Fund. There is to be **no** money paid now. The appeal distinctly states:

"Subscriptions may be made in units of $5.00 or multiples of $5.00. A deficit of, for example, $250 will be met by **pro rata** payment from each guarantor, which payment would amount to 25 cents on each dollar subscribed, or $1.25 for each $5.00 subscription. **The larger the total amount subscribed, the smaller the pro rata payment.**"

This means that the $5.00 or multiple of $5.00 is **pledged**, and not paid to us now. In the event of a deficit, a **pro rata call** on this pledge is made by the Central Office. With the removal of this misunderstanding, there will no doubt be an increase in the number of pledges received.

We want every E. A. N. A. member, in fact,—every Esperantist in America to co-operate in this new plan,—for Esperanto, for the national Association to which your loyalty and support are due, and for the officers who now for the third year are giving valuable time, money and labor that this work may be carried on. One of our officers writes: "Heavens! If we would all only really work about an hour a week on this Esperanto proposition, where wouldn't we land!"

Our present fiscal year is well under way, and 1916 lies before us. There are many yet to be heard from,—YOU?

### Our Committees

**Propaganda:** Mr. Robt. Colquhoun of California, President of the 11th Universal Congress, has been added to this Committee, which already includes D. E. Parrish, Chairman, and Herbert M. Scott. The matter of securing material for an interesting lantern-slide lecture is receiving attention. It is hoped to provide the Esperantists of this country with an ideal "Lantern-slide Esperanto Lecture" for use wherever it may be desired or can do good at the opportune time. The Central Office will be the custodian of the material for the lecture, further details of which will be given in succeeding issues. Perhaps there are some among our readers who already have Esperanto slides in their possession. The Committee will welcome all information on this subject.

**Examinations:** The returns from the circular issued by the Central Office have been noticeable for the number of requests for information concerning examinations which were received. A diploma from the Association attests your knowledge of Esperanto. The new examinations for

the "Elementa" and "Supera" diplomas, compiled by Mr. Harris, are now in use.

Passed "Elementa" examination:
Ernest J. Cochran, Ohio.

**School Committee:** A standing committee to work for the introduction of Esperanto into the schools has been appointed by the councilors, consisting of Julian E. Fast, Chairman, Delphos, Ohio; Dr. D. O. S. Lowell, Roxbury, Mass., and B. E. Myers, Redwood City, Calif. The help of the officers, of the Propaganda Committee and of the Publications Committee will be united with this new Committee. A definite policy will be determined upon and adhered to. No one can flatter themselves that this work will not be discouraging and tedious,—but the Councilor body is congratulating itself that it has the right men for the place.

## WITH THE DISTRICT ASSOCIATIONS

**Greater New York Esperanto Society:** With more regret than we are able to say, we must accept the resignation of Jas. F. Morton, Jr., as Councilor of the New York Division. Mr. Morton has accepted a position as lecturer for the New York Single Tax Bureau, work for which he is eminently fitted, and as his duties will force him to be away from New York City, for months at a time, he is obliged to resign his councilorship. We do not need Mr. Morton's assurance to know that Esperanto will still receive all the attention he is able to give it. Regretting the severing of his official connection with the Association, the personal good wishes for success in his new work go with him from every worker at the Central Office.

**Gratulojn!**

Plezure ni anoncas la jenan: Al L.H. kaj Mattie Gorham, 2907 Octavia str., San Francisko, naskiĝis filo, Marvin Keith Gorham. Novan Esperantiston ni ĉiam bonvenas. Korajn gratulojn al la feliĉaj geedzoj kaj bondezirojn al Sinjoreto Marvino.

**Sustaining Member:**
H. W. Fisher, Perth Amboy.

END OF OFFICIAL PART

---

Mastrino—Mi povas doni al vi iom da malvarma manĝaĵo.
Vagulo—Kial ne varmigi ĝin?
Mastrino—Estas neniom da ligno dissegita.
Vagulo—Nu, donu ĝin malvarman. —Trad. Ho Ho

"Jes," diris la mondvojaĝinto, "la Ĥinoj nepre pagas ĉiujn siajn ŝuldojn je la unua tago de la nova jaro."

"Mi jam aŭdis pri tio," respondis la usona gastigantô, "sed la Ĥinoj ne havas Kristnaskan feston dum la antaŭa semajno!" —Trad. Ho Ho

"Joĉjo," demandis la profesoro de anatomio, "kio estas la spino?"

"La spino," respondis la sensaĝa studento, "estas la afero kiu iras supren kaj malsupren laŭ via dorso. Via kapo sidas sur unu finaĵo, kaj vi sidas sur la alia." —Trad. Lehman Wendell.

"Kio estas akvo, Bill?" demandis la instruisto de juna knabo.

"Akvo," respondis la alia, "estas senkolera fluido, kiu fariĝas nigra kiam oni metas la manojn en ĝin." —Trad. Lehman Wendell.

## LITERATURA KONKURSO—DUA KATEGORIO—1A PREMIO
## LA BETULO KAJ LA STELO

De Zacharias Topelius

Ankoraŭ mi scias legendon el pasintaj tempoj pri knabo kaj knabino, kiuj dum la vivo sin direktis al sola celo. Ĉu multaj inter ni povas diri la saman pri si?

Antaŭ cent sepdek jaroj la stato en Finnlando estis tre mizera. La milito ĉie dezertigis, urboj kaj vilaĝoj brulis, rikoltoj estis pereigitaj kaj pli ol centmiloj da homoj estis ekstermitaj per glavo, malsato, ekzilo kaj teruraj malsanoj. Tiam oni aŭdis kaj vidis nur ekĝemojn kaj larmojn, plendojn, malĝojon, cindron kaj sangon, kaj tiuj, kiuj plej longe esperis, fine nesciis kion esperi. Skurĝo de Dio premegis la landon kaj la memoron de tiu tempo oni neniam forgesos. Ofte okazis dum tiama malfeliĉo, ke multaj familioj disiĝis, kelkaj estis forkondukitaj al malamiklando, aliaj serĉis rifuĝon en arbaroj kaj dezertoj aŭ malproksime en Svedlando; edzino ne plu sciis pri sia edzo, nek frato pri sia fratino, la gepatroj nesciis ĉu iliaj infanoj vivis aŭ estis mortintaj. Tial, kiam fine la paco fariĝis kaj la ankoraŭ vivantaj revenis, nur nemultaj estis, kiuj ne priploris iun el siaj karaj. Kiel en la fabelo pri la juna edzino de kavaliro Blubarbo, kiu sendis sian fratinon en la turon, kie oni la vojon de malproksime vidis kaj senĉese ŝin demandis: "Anjo, fratino mia, ĉu vi ne vidas venanton?"—jen nun oni demandis unu la alian en la soleco de la hejmo pro la foresto de la karaj: "Ĉu vi ne vidas venanton? Ĉu ankoraŭ neniu revenas?" Kaj ordinare oni ricevis respondon: "Neniu, neniu!" Sed kelkfoje okazis, kiel en la fabelo pri la Blubarbo, ke malproksime sur la vojo vidiĝis nubeto da polvo; la nubo alproksimiĝis kaj fine oni distingis aron da forkurintoj, kiuj serĉis la parencojn . . . . . Jen la okuloj de gepatroj serĉis siajn karulojn, kaj, se ilin trovante post longaj jaroj, fariĝis ĝojo, kvazaŭ malĝojo neniam ekzistis, la dometoj rekonstruiĝis, la kampoj denove donis rikoltojn kaj nova tempo komenciĝis post la pasintaj suferoj.

Dum la longedaŭra milito, inter multaj aliaj, ankaŭ du malgrandaj gefratoj estis forkondukitaj en fremdan landon kaj tie trovintaj afablajn homojn, kiuj ilin prenis sub sia protekto. La jaroj pasis, la infanoj kreskadis kaj nenio mankis al ili. Tamen meze de la riĉeco ili ne povis forgesi patron, patrinon kaj patrolandon. Fariĝis al ili kiel al la malliberaj israelidoj en Babilono, kiuj pendigis siajn harpojn sur branĉojn de l'salikoj kaj ne povis kanti, nek ludi, nek danci en la fremda lando, ĉar ilia koro restis en Jerusalemo.

Kiam do la famo disvastiĝis, ke paco regis en Finnlando kaj ĉiuj, kiuj volis kaj deziris povis tien reveni, tiam la restado en la fremda lando fariĝis tro peniga por la infanoj kaj ili petis hejmen reiri.

La fremduloj, iliaj protektantoj, ridetis kaj diris: "Hejmen reiri? Malprudentaj infanoj, ĉu vi ne scias kiel malproksime vi devas iri? Pli ol cent mejlojn."

"Estas indiferente," respondis la infanoj, "nur ni iras hejmen."

"Ĉu vi ne trovis ĉe ni vian novan hejmen? Tie ĉi vi sufiĉege havas vestojn, manĝon, bonajn fruktojn, lakton, belajn loĝejojn kaj amikojn, kiuj vin amas de sia tuta koro. Kion vi plu deziras?"

"Jes," diris la infanoj, "sed ni volas iri hejmen."

"En via hejmo estas granda malsufiĉo kaj manko. Vian vivon vi pasigos en malriĉeco, de musko konsistos via lito sub tegmento de abibranĉoj, blovo kaj malvarmo estos viaj senĉesaj akompanantoj, ŝelo de l'arboj via ĉiutaga pano. Viaj gepatroj, gefratoj kaj ĉiuj amikoj jam de longe estas mortintaj. Kiam vi iliajn post-signojn serĉos vi estos trovantaj post-signojn de lupoj, kiuj transiris la neĝamasojn sur la dezerta loko, kie foje staris via dometo."

"Jes," diris la infanoj, "sed ni volas iri hejmen."

"Jam dek jaroj pasis depost via forkonduko. Tiam vi estis etaj kaj infanaj: la frato kvinaĝa, la fratino kvar. Nun vi estas dekkvin- kaj dekkvaraĝaj kaj nur malmulte konas la mondon. Ĉion vi jam forgesis, la vojon tien kaj eĉ viajn gepatrojn. Kaj same kiel vi forgesis ilin, ili ankaŭ forgesis vin."

"Jes," diris la infanoj. "Sed ni volas iri hejmen."

"Kiu do montros al vi la vojon?"

"Dio," respondis la knabo. "Krom tio mi memoras, ke sur la korto de niaj gepatroj kreskas granda betulo, kie aro da belaj birdoj kantas somermatene."

"Kaj mi memoras," diris la knabino, "ke la vesperstelo brilas inter folioj de la betulo."

"Ho, malspritaj infanoj," diris la fremduloj, "vi petas absurdon, kiu estus via pereo." Kaj ili malpermesis la infanojn plu pensi pri tio.

Sed ju pli ili malpermesis, des pli la infanoj pensis, ne pro malobeemo, sed pro tio, ke ili ĉiam kaj nekontraŭstareble sopiris je sia patrolando. Fine en lunluma nokto, kiam la knabo pro tiuj pensoj vane klopodis fermi siajn okulojn, li demandis sian fratinon: "Ĉu vi dormas?"

"Ne," ŝi respondis, "mi ne povas dormi, mi pensas pri nia hejmo."

"Jen ankaŭ mi," diris la knabo. "Venu, ni enpaketigu niajn vestojn kaj forkuru de tie ĉi. Ŝajnas al mi, ke Dio diras en mia koro senĉese: iru hejmen, iru hejmen! Kaj tio kion Dio diras, ne povas esti peko."

"Jes," respondis la fratino. Kaj senbrue ili foriris.

Ekstere la luno klare lumigis la vojojn kej bela estis la nokto. Iom irante diras la knabino:

"Frato mia, mi timas, ke ni ne trovos la vojon hejmen."

La frato respondis: "Ni ĉiam iru nordokcidente, kie ni vidas la sunon malleviĝantan mezsomere, en tiu direkto troviĝas nia hejmo. Kaj trovante la betulon sur la korto kaj vidante la klaran stelon, brilanta tra ĝiaj folioj, tiam ni sciu, ke ni nian hejmon atingis."

Post ioma tempo denove diris la fratino: "Frato mia, mi timas sovaĝajn bestojn kaj rabistojn."

La frato respondis: "Dio gardos nin. Ĉu vi ankoraŭ memoras la preĝon, kiun ni lernis estante etaj:

"Kien ajn en mond' mi iras,
Dio miajn paŝojn gvidas."

"Jes, mi memoras," diris la knabino. "Kaj Dio sendos siajn anĝelojn por nin akompani en la fremda lando."

Kaj ili kuraĝe antaŭeniris. La knabo faris al si bonan bastonon de juna kverko por defendi per ĝi sin kaj fratinon. Sed nenia malbono al ili okazis.

Foje ili alvenis al loko, kie du egale larĝaj vojoj disiĝis al kontraŭa direkto kaj ili ŝanceliĝis kiun elekti. Sed je la maldekstra vojo du birdetoj kantis.

"Venu" diris la frato; "Tiu vojo estas la ĝusta, tion sciigas al mi la pepado de l'birdoj."

"Jes," rimarkis la fratino, "niaj birdoj ne estas ordinaraj birdoj. La anĝeloj de Dio prenis sur sin la formojn de birdoj, por nin konduki hejmen."

Ili daŭrigis la iradon kaj la birdoj flugis antaŭ ili de branĉo al branĉo, ne pli rapide, ol ke ili bone povis ilin sekvi. La infanoj manĝis la fruktojn de l'arbaro, ili trinkis la klaran akvon de la fontoj kaj nokte ili dormis sur kuŝejo de mola musko. Ili miregis, ĉar kien ajn ili alvenis, ili trovis manĝon kaj kie ajn ili haltis vespere, ili trovis lokon kie ripozi. Ili ne povis tion klarigi. Sed ĉiufoje vidante la birdojn, ili ekkriis: "Atentu, la anĝeloj de Dio nin kondukas!" Jen ili iradis longajn distancojn antaŭen.

Fine la knabino komencis laciĝi kaj demandis la knabon:

"Kiam ni povos serĉi nian betulon?"

La knabo respondis: "Ne antaŭ ol ni aŭdos ĉirkaŭ ni la lingvon, kiun parolis niaj gepatroj."

Denove ili longe iradis okcidente kaj norde, la somero komencis pasi kaj malvarmeto sin sentigis en la arbaroj. La knabino diris:

"Ĉu ne jam nia betulo vidiĝas?"

"Ne ankoraŭ," respondis la knabo.

La lando, kie ili troviĝis, estis ŝanĝinta aspekton. Ĝis nun ili trairis vastajn ebenajojn. La nuna lando prezentis montetojn, montojn, riverojn kaj grandajn lagojn. La knabino ekĝemis:

"Kiel ni transiros la krutajn montojn?"

La knabo ŝin konsolis:

"Mi vin portos." Kaj li portis ŝin.

Ree miris la knabino:

"Kiel ni transveturos la torentojn kaj la egajn lagojn?"

"Ni remu," respondis la knabo. Kaj li transremis la riverojn kaj lagojn, ĉar ĉie, kiam ili alproksimiĝis la bordon, jen boato, ĝuste kvazaŭ ilin atendante. Kelkajn riverojn la knabo transnaĝis kun sia fratino. Kaj la ondoj ilin senpeze portis kvazaŭ akvo-

birdojn, ĉar la anĝeloj flugis apud ili kaj preparis la vojon.

Foje ili frumatene sen ripozo estis irintaj kaj sin sentis tre lacaj. Vespere ili atingis izolan loĝejon, antaŭ nelonge konstruita de kruda ligno sur cindro de antaŭe bruligita domo. Sur la korto infaneto senŝeligis rapojn.

"Ĉu vi bonvolus doni al ni unu el viaj rapoj?" demandis la knabo.

"Volonte, venu en la ĉambron," respondis la infano, "Panjo donos al vi manĝon."

Tiam la knabo laŭte aplaŭdis, ĉirkaŭprenis la infanon kaj ploris pro ĝojo.

"Kial vi jen ĝojas, frato mia?" demandis la knabino.

"Ĉu mi ne ĝojus?" respondis la knabo. "Tiu infano parolas la lingvon de nia patro kaj patrino. Nun ni komencu serĉi la betulon kaj la stelon."

Poste ili eniris la dometon kaj estis afable akceptataj. La loĝantoj ilin demandis de kie ili venis. La knabo klarigis:

"Ni venas el fremda lando kaj serĉas nian hejmon, sed ne havas alian markon de ĝi, ol grandan betulon sur la korto, kie la birdoj somermatene kantas kaj tra kies foliaro vespere klara stelo lumas."

"Kompatindaj infanoj," diris la komplezemaj homoj. "Sur la tero kreskas miloj da betuloj kaj sur la ĉielo lumas miloj da steloj. Kiel estos al vi eble trovi la ĝustajn?"

La gefratoj respondis: "Dio kondukos nin. Ĉu ne jam liaj anĝeloj nin gvidis de tiel malproksime al nia lando. Ni ja estas jam preskaŭ duone hejme."

"Finnlando estas granda," diris la mastro de l' domo, skuante la kapon.

"Sed Dio estas pli granda," respondis la knabo. Kaj dankinte ilin, la infanoj daŭrigis sian migradon.

Nun ili ne plu bezonis manĝi kaj dormi en la arbaroj, nur iri de domo al domo kaj kvankam vastaj dezertoj kaj interspacoj etendiĝis inter la homloĝejoj kaj ega malriĉeco ĉie regis, ili tamen je bezono trovis enirejon kaj panon, ĉar ĉiuj ilin kompatis. Sed la betulon kaj la stelon ili ne trovis. Domon post domo ili atingis, vidis multajn betulojn kaj multajn stelojn, sed ne la ĝustajn.

"Ho," ekĝemis la knabino, "Finnlando estas tiel granda kaj ni malgranda! Neniam ni trovos nian hejmon." La knabo ŝin riproĉis:

"Ĉu vi fidas al Dio?"

Ŝi jesis.

"Tiam vi sciaş," diris la knabo, "ke eĉ pli grandaj mirakloj okazis. Kiam la paŝtistoj nokte iris al Betlehemo, la stelo antaŭiris ilin. La saman ĝi faras al ni, nur ni kredus."

"Jes," diris la knabino, kiel ŝi kutimis respondi al sia frato. Kaj kun gaja kredo ili antaŭen paŝis.

Foje, kiam vesperiĝis, ili alvenis al izola domo. Estis la dua jaro de ilia migrado, antaŭvespero de Pentekosto, en fino de majo, kiam la arboj jus foliiĝis. Enpaŝante la korton, vidiĝis grandsupra betulo kun delikataj folioj kaj tra la helverda foliaro en la duonklara vespero lumis la brila vesperstelo. Estis jam tiel somerhele, ke nur tiu sola stelo estis videbla sur la ĉielo, ĉar ĝi estis la plej granda kaj plej klara el ĉiuj.

"Jen nia betulo!" tuj ekkriis la knabo. "Jen nia stelo!" same faris la knabino. Kaj ili ĉirkaŭ prenis unu la alian kaj dankis Dion kun larmoj de ĝojo.

"Jen estas la stalo, kien paĉjo enigis la ĉevalojn," diris la knabo meditante.

"Kaj mi rekonas la puton, je kiu panjo donis trinki al la bovinoj," rememoriĝis la knabino.

"Sub la betulo staris du krucetoj, kion ili signifas?" rimarkis la knabo.

"Mi timas eniri la dometon," diris la knabino. "Pensu, eble ne plu vivas paĉjo kaj panjo, aŭ se ili ne plu rekonos nin! Frato mia, vi eniru unue."

"Ni aŭskultu je la pordo," proponis la knabo kun koro batanta.

En la dometo troviĝis maljuna viro kun sia edzino. Efektive ili ne estis maljunaj, sed maltrankvileco kaj mizero antaŭtempe sulkigis iliajn fruntojn.

Parolis la viro al sia edzino: "Nun estas Pentekosto, kiam Dio sendis konsolanton al la malĝojaj koroj; sed ni neniam konsolon ricevas. Ĉiuj niaj kvar infanoj estas for; du dormas sub la betulo, du estas forkondukitaj en fremdan landon kaj certe neniam revenos. Estas maldolĉe en soleco maljuniĝi."

La edzino diris: "Ĉu ne Dio estas ĉiopova kaj eterne bona? Li, kiu rekondukis la israelidojn el la malliberejo, ankaŭ povas redoni al ni niajn infanojn, se ŝajnas al li utile. Kiomjaraj nun estus niaj plej junaj infanoj, se ili vivus?"

"La knabo estus dekses kaj la kna-

bino dekkvin," respondis la patro. "Ho tian benon ni ne meritas, ke ni la karajn infanojn rericevus."

Dum li ankoraŭ parolis, la pordo malfermiĝis kaj eniris knabo kaj knabino, dirante sin alveni de tre malproksime kaj petis panpecon.

"Proksimiĝu, infanoj," diris la patro, "kaj pasigu nokton tie ĉi! Ho, jen grandaj ankaŭ estus niaj plej junaj infanoj, kiujn oni forprenis."

"Vidu," diris la edzino, "tiajn belajn infanojn! Ha, jen belaj ankaŭ estus niaj infanoj, se ili ankoraŭ vivus kune kun ni!"

Kaj la ambaŭ gepatroj malĝoje ploris. Tiam la infanoj ne plu povis sin deteni, sed kun larmoj sin jetis al brusto de l' patro kaj patrino ekkriante: "Ĉu vi ne rekonas nin? Ni ja estas viaj karaj infanoj, kiujn Dio mirinde rekondukis el la fremda lando."

Kaj la gepatroj ilin ĉirkaŭprenis kun senlima amo kaj kune kun la infanoj genufleksis kaj Dion dankis, kiu ĝuste en la Pentekosto al ili donacis tian grandan konsolon.

Poste la infanoj devis rakonti siajn travivajojn kaj la gepatroj rakontis pri siaj, kaj kvankam ĉiuj spertis multe da malĝojo, ŝajnis ĝi nun tute forgesata kaj ŝanĝata en ĝojo. La patro provis brakojn de la filo kaj gajiĝis pri ilia forteco. La patrino karesis la brunajn harligojn de sia filino kaj kisis centfoje ŝiajn ruĝajn vangojn.

"Jes," ŝi diris kun infana gajeco, "ĉerte mi ja atendis ion hodiaŭ okazintan, ĉar du fremdaj birdoj tiel bele kantis en la betulo."

"Ilin mi bone konas," ekkriis la knabino. "Ili estas du anĝeloj sub formo de birdoj, kiuj la tutan vojon flugis antaŭ ni kaj direktis nian migradon. Nun ili partoprenas en nia ĝojo, ĉar ni trovis nian hejmon."

"Venu, por saluti ankoraŭ foje la betulon kaj la stelon," proponis la knabo. "Vidu, fratino mia, jen sube dormas niaj malgrandaj gefratoj. Se estus ni, kiuj dormas sub la verda herbotufo kaj niaj gefratoj anstataŭante nin nun rigardus nian tombon, kiaj ni estus?"

"Certe vi estus anĝeloj de Dio en la ĉielo," respondis milde la patrino.

"Nun mi scias," diris la knabino. "La anĝeloj, kiuj sub formo de birdoj nin akompanis la tutan vojon kaj kiuj hodiaŭ anoncis nian revenon en la betulo, estis niaj malgrandaj gefratoj, kiuj dormas en la tombo. Estis ili, kiuj senĉese diris en niaj koroj: Iru hejmen, iru hejmen por konsoli paĉjon kaj panjon! Estis ili, kiuj en la dezertoj gvidis nin, por ke ni ne malsatmortu, kiuj pretigis al ni litojn de musko, por ke ni ne frostmortu, kiuj je la torentoj sendis al ni boatojn, por ke ni ne dronu. Estis ankaŭ ili, kiuj diris al ni: Jen estas la ĝusta betulo, la ĝusta stelo inter miloj. Dio ilin elektis kaj sendis por nin protekti. Dankon, gefratoj niaj! Dankon, bona Dio!"

"Jes," aldonis la knabo; "kaj atentu kiel klarigata la serena stelo de l' ĉielo lumas tra la foliaro de l' betulo! Nun ni trovis nian hejmon; nun ni ne migru plu, fratino mia!"

"Karaj infanoj," diris la patro, "la vivo de l'homo estas senĉesa antaŭenirado al eterna celo. Daŭrigu la antaŭeniron, faru tion kun Dio en via koro kaj kun la eterna celo antaŭ viaj okuloj! Vi iris firme antaŭen, gvidataj de anĝeloj;—Ho, ili montru daŭre al vi la vojon! Vi celis la betulon—ĝi signifas vian patrolandon. Bone, ĝi estu la ĉiama celo de via amo kaj laboro! Vi celis la stelon—ĝi signifas la eternan vivon. Bone, ĝi lumu al vi, dum via tuta vivo!"

"Amen, jen estu!" diris la infanoj kaj la patrino kun krucigitaj manoj.

El la finna, tradukis S-ino Hilma Hall, Aggelby, Finnlando.

---

Patrino—Riĉjo kara, kial vi ne ludas?
Riĉjo—Mi havas nenian kunludanton.
Patrino—Nu, venigu Karlon de la apuda domo.
Riĉjo—Ho, mi ludis hieraŭ kun li, kaj tial kredeble li ankoraŭ ne estas sufiĉe sana por elveni. —Trad. Ho Ho

# LA LEONOJ KAJ LA BOVOJ

## De James Anthony Froude, M. A.

Foje kelke da bovoj eliris el dezerto por eklogi en vastaj herbejoj apud rivero. Mizeraj malfeliĉuloj ili estis; kaj ili trovis la ŝanĝon agrabla, escepte aron da leonoj, kiuj loĝis en la apudaj montoj, kaj kiuj postulis rajton manĝi tiom da bovoj kiom ili volis, pro sia permeso al la bovoj tie resti. La bovaro sin submetis, parte ĉar ĝi estis tro malforta por rifuzi, parte ĉar la leonoj diris ke tio estas la volo de Jupitero, kaj la bovoj kredis al ili.

Tiamaniere daŭre vivis multaj generacioj; ĝis fine, pro pli bona paŝtajo, la bovoj fariĝis pli grandaj kaj fortaj, kaj tre multiĝis; kaj la leonaro, pro aliaj kaŭzoj, samtempe malmultiĝis; ili estis pli malmultaj, pli malgrandaj kaj pli malbonaspektaj ol antaŭe; kaj, krom ilia memestimo kaj la apetito, kiu estis pli ol iam avida, restis al ili nenio el la antaŭa leonecaro.

Iun tagon granda Bovo trankvile paŝtadis, kiam unu el ĉi tiuj leonoj alvenis, kaj petis ke la Bovo sin sternu, ĉar li volis manĝi lin. La Bovo levis la kapon kaj serioze protestis. La leono murmuregis; la Bovo estis milda, sed firma. La Leono insistis pri sia leĝa rajto; kaj ili fine interkonsentis, ke Minos povos decidi la aferon.

Kiam ili venis en la juĝejon, la Leono akuzis la Bovon, dirante ke ĉi tiu rompis la leĝojn de la bestaro; la Leono estas reĝo, kaj la aliaj devos nepre obei. La determinita praktikado evidente favoris la Leonon. Minos alvokis la Bovon por sindefendi.

La Bovo diris ke, nekonsentinte li estas naskita en ĉi tiun herbejon. Li ne sin taksas tre alte; sed, kia li estas, tia li trovas sin tre feliĉa, kaj dankas Jupiteron. Nu, se la Leono povos pruvi, ke la ekzistado de leonoj pli valoras por Jupitero ol la ekzistado de bovoj, li ne pledos plu; li estos preta sin oferi. Sed ĉi tiu Leono jam elmanĝis mil bovojn. La apetito de leonoj estas tiel avida, ke li ne povos ne demandi, ĉu ili efektive valoras tiom, kiom oni faras por ili—ĉu la vivado de unu leono estas tiel nobla, ke ĝi superas la vivadojn de miloj da bovoj. Li volonte cedas ke leonoj ĉiam manĝadis bovojn; sed la leonoj, kiam ili unue alvenis al la herbejoj, estis tre malsama speco de besto; kaj ankaŭ la bovoj mem (jen la Bovo fiere sin rigardis) de tiu tempo pliboniĝis. Juĝante laŭ la aspekto (kvankam tio povas esti eraraĝa) li mem estas egale tiel bona besto kiel la leono. Tamen, se la leonoj volos vivi pli noblan vivadon ol la bovoj povas vivi, li ne pledos. Sed, laŭ la nunaj kondiĉoj, li pledas ke la kosto estas tro granda.

Tiam la Leono aperigas imponan mienon, kaj penis blekigi; sed, malfermante la buŝon, li elmontris makzelon tiel malsufiĉe provizitan perdentoj, ke Minos ridegis, kaj diris al la Bovo, ke tiu ĉi mem kulpiĝis, se li permesos ke tia besto lin manĝu. Se li persistos rifuzi, verŝajne la Leono lin ne perfortos.

Esperantistoj, ne timu fanfaronulon!

(Laŭ permeso de Longmans, Green & Co., kaj Chas. Scribner's Sons).

Tradukis Herbert Harris

# Nova Fizika Leĝo?

S-ro Francis E. Nipher, profesoro de fiziko ĉe Washington-Universitato, en St. Louis (Missouri, Usono), eltrovis siaopinie novan leĝon de fiziko, kiu, li pensas, kondukemos al vastaj ŝanĝoj ĉe la konstruprincipoj de l'fortaplika maŝinaro.

La pretendata eltrovo estas, ke sur deklivo de 45 ĝis 60 gradoj oni bezonas, por ŝovi objekton, pli da forto, ol oni bezonus, por rekte levi ĝin. La klarigo estas, ke sur deklivo inter la gradoj supre diritaj la frota rezisto faras la ŝarĝon pli peza ol ĝia neta pezo.

Prof. Nipher lekciadis antaŭ klasoj de inĝenierscienco kaj uzadis formulojn. Poste, trakontrolante la formulojn, li trovis, ke dum la rezisto ĝis 45 gradoj kaj super 60 gradoj estas malpli, ol la neta pezo, inter tiuj punktoj ĝi estas pli granda, kun la maksimuma rezisto inter 50 kaj 55 gradoj.

Li esploris plue kaj trovis, ke, kiom li povis ekscii, oni tute ne konis antaŭe tian leĝon. Li diris, ke li ankoraŭ ne havis tempon, por tramediti la rilatojn de la eltrovo, sed li ne dubas, ke ĝi efikos revolucie sur la konstruadon de maŝinaro por venki la frotreziston.

Tradukis Herbert M. Scott.

# LA ARTISTO

## De Oscar Wilde

Foje vespere venis en lian animon la deziro skulpti figuron de la Plezuro Momenta. Kaj li ekiris en la mondon serĉante por bronzo; ĉar nur en bronzo povis li pensi.

Sed la bronzo en la tuta mondo estis tute malaperinta, nenie tutmonde iom da bronzo troviĝis, krom la bronzo de la figuro de la Malĝojo Ĉiama.

Jen tiu ĉi figuro estis formita de li mem, per liaj propraj manoj, kaj estis metita sur la tombon de la sola estajo kiun li plej estis aminta en la vivo. Sur la tombon de la mortinta estajo kiun li plej estis aminta tiu ĉi figuro de lia propra faro estis metita de li, ke ĝi staru kiel signo de la amo homa, kiu ne mortas, kaj simbolo de la malĝojo homa, kiu daŭras por ĉiam. Kaj en la tuta mondo estis neniu alia bronzo ol la bronzo de tiu ĉi figuro.

Kaj li prenis la figuron, kiun li estis forminta, kaj metis ĝin en grandegan fornon kaj donis ĝin al la fajro.

Kaj el la bronzo de la figuro de la Malĝojo Ĉiama li formis figuron de la Plezuro Momenta.

El la angla, tradukis
J. Lekberg

---

S-ro Creston C. Coigne, Sekretario de la Nov-Jorka Distrikto, ricevis leteron de internigita soldato en Holando, kaj interesa ekstrakto pri la Esperanta laboro en la internejo estas elĉerpita:

"* * * Mi klarigas al vi sube kiel la internacia lingvo estas naskiĝinta en la internejo.

"Delegito de la U.E.A. por la regiono de Bruselo, nomata H. Bonabo, okaze estis internigita kiel ni. Iun tagon li renkontis belgan soldaton kiel li internigita; kvankam li ne konis la personon, tamen li vidis ke la sinjoro estas Esperantisto, dankon al la verda steleto kiun li portis sur sia uniformo, propaganda signo, kiun ĉiu Esperantisto portu ĉiam. Tuj S-ro Bonabo alparolis la personon kaj tuj estis inter ili amikaj paroloj. Nun, estante du, ili uzis ĉiujn helpilojn por propagandi inter la internigitaj soldatoj, pri la internacia lingvo. Senprokraste ili faris aldemandon kaj subite ili akiris disponeblan lokon per interveno de la holanda militestro.

"Unu kurso malfermiĝis sekvita de ĉirkaŭ dudek lernantoj, dua kurso komenciĝis, kiu produktis pli multe da fruktoj, estante sekvita de proksimume tridek lernantoj. Nun, tria kurso jam estas malfermita kaj la profesoro helpata de la lernantoj de la antaŭaj kursoj kiuj estas fervoraj propagandistoj, estas varbinta sepdek lernantojn. Do, estas jam en la tendaro de Harderwyk, kvindeko da soldatoj de ĉiuj gradoj, kiuj flue parolas la Esperantan lingvon kaj ni antaŭvidas ke post mallonga tempo ni estas proksimume cent-tridek Esperantistoj.

"De nun oni povas diri ke la tendaro en Harderwyk estas Esperanta vilaĝo. * * *"

Henriko Demeersseman,
Brigadier, 18e Cie., bloc 5,
Harderwyk, Holando

---

STATEMENT OF OWNERSHIP, ETC.

Of Amerika Esperantisto, published monthly at West Newton, Mass., required by the Act of August 24, 1912.

Editor, Dr. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass.
Managing Editor, Same.
Business Manager, same.
Publisher, The American Esperantist Co., Inc. West Newton, Mass.
Owners: (If a corporation, give names and addresses of stockholders holding 1 p.c. or more of total amount of stock.)
The Esperanto Association of North America, Inc., J. D. Hailman, Pittsburgh, Pa.; C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass., Dr. B.K. Simonek, Chicago Ill. Officers.
Ernest F. Dow, West Newton, Mass.
Known bondholders, mortgages, and other security holders, holding 1 p. c. or more of total amount of bonds, mortgages, or other securities: None.

(Signed) C. H. Fessenden,
Business Manager.

Mass., ss. Sworn to and subscribed before me this 10th day of October, 1915.

Jos. B. Ross, Notary Public

(Seal) My commission expires May 1, 1920.

**FOR 60 c.**

(Sm. 1,250) we will send to you,

1 CONGRESS BADGE $ .35
20 EXPOSITION POSTALS IN ESPERANTO .15
20 CALIFORNIA POSTALS IN ESPERANTO .15
1 48 PAGE ESPERANTO GUIDE BOOK OF SAN FRANCISCO AND VICINITY .05

The above prices are 30% below actual cost

**THE KALIFORNIA ESPERANTISTA RONDARO**

946 Central Ave.,
SAN FRANCISCO, CALIF.
Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista

**THE WRITER'S MONTHLY**

**A Monthly Magazine of Interest to Literary Folks**

**$1.00 Yearly**

**THE WRITER'S MONTHLY**

SPRINGFIELD, MASS.

### Annual Meeting

The annual meeting of the stockholders and directors of the American Esperantist Co., Inc., will be held on Jan. 15, 1916, at 3 P. M. Presence in person or by proxy of all stockholders is earnestly desired.

I. A. MacCaffrey, Sec'y.



### ORDER BLANK

**The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.**

Please send me at once, the items checked below, for which I enclose the sum of $..........

Name ..............................................

Address ..............................................

..............................................

Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, $1.00

COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, $1.25 postpaid

Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, $2.00

STUDENTS COMPLETE TEXT BOOK (O'Connor), cloth, 50 cents

PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), 50 cents

Send me also the following literature as shown in your book-list:

## A COURSE IN ESPERANTO

By IVY KELLERMAN REED, L.L.B., A.M., Ph.D.

READ

## THE WASHINGTON COURIER

**Published Every Saturday**

**15 cents a copy, Five Dollars a Year**

A National Weekly edited by men and women, who tell you what you want to know, in the way you want to read it.

**Special trial offer to readers of the American Esperantist:**

THREE MONTHS FOR ONE DOLLAR

WASHINGTON COURIER

Munsey Building, - Washington, D. C.

### DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro F. W. Spencer, Blackloam, B. C., Can. 1

S-ro P. At. Kolev, 46 str. Regentska, Sofio, Bulgaria. Pri kulturado de abeloj, kokoj, kunikloj, ktp. 1

S-ro Emil Lelievre, Bureau des Renseignements, 37e, Reg. d'Infant, Troyes, Francujo.

S-ro Andrej Sidorov, 7, Gruzovaja ul. Voronej, Russia, kun tutmondaj gesamideanoj. 12

S-ro Sebastian Chaler, S. Mariano 124, Tarrasa, Spain. 3

S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Pk. Bvd. New York, N. Y., serĉas angle kaj esperante rakontojn de diversspecaj abnormalaj psikaj spertoj.

### MONOGRAM EMBOSSER

Handy, compact, distinctive neat everlasting. An ideal gift. One or two letters, 25 cents. Leahy's, Box 264, Alexandria, Va.

## Magazine Subscriptions

Subscriptions for your favorite periodicals at our combination prices. Orders for any magazine published anywhere may be sent to us. Prompt and satisfactory service— **TRY US!**

**The American Esperantist Co.**

**WEST NEWTON, MASS.**

## "LA ONDO DE ESPERANTO"

monata ilustrata ĵurnalo, eldonata en Ruslando

## 1916—VIII-a—jaro

La jurnalo aperas akurate la 1-n daton novstile. Ĉiu kajero havas 16-24 paĝojn. Formato 17x26 cm. La kunlaboradon partoprenas ĉiulandaj esperantaj verkistoj. Literaturaj konkursoj premiataj. Portretij de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustrajoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Koresponda fako.

Por progresigi la esperantan sciencan literaturon la jurnalo senpage donos al la abonantoj en la jaro 1916 1-an parton de granda, 360 paĝa, populare-scienca verko de Profesoro de Moskva Universitato K. A. Timirjazjev.


**"LA VIVO DE KRESKAJOJ"**

**Tradukita de Doktoro Andreo Fiŝer**

La abonpagon—2 rubloj=2,120 sm.=fr.5.35 =mk. 4,32, kr. 5,02, 4 ŝil. 3 p., 2,65 gul., sved. kr. 3,84, 1.03 dol. (laŭ la poŝta internacia konvencio)—oni sendu al **Moskva Librejo "Esperanto" (Moskvo, Lubjanskij pr. 3, Ruslando)** poŝtmandate, papermone, bankĉeke aŭ pere de enlandaj esperantaj librejoj.

Ĉar dum la milito la poŝtmandata institucio ne funkcias, la eksterlandanoj tre oportune povas aboni al la jurnalo, sen kurza perdo kaj multaj poŝtelspezoj, sendante 17 respondkuponojn en rekomendita letero.

La anonco en Koresponda fako kostas 30 kop. aŭ 3 respondkuponojn.




# LA ALVENO DE

## La "Emerson" Aŭtomata Fortepiano

La tago kiam ĝi alvenas estos la unua de vivtempo kies tagoj estas plenegaj je alloga intereso, instruado kaj amuzado; ĝojajoj en kiuj ĉiu ano de la familio povas partopreni.

La "Emerson" Aŭtomata enhavas grandegan fortepianon, mondfaman de pli ol 65 jaroj pro sia tona kaj konstrua beleco; kaj ludigilon notindan pro sia reproduktado de la tuŝo muzikista.

La rulajoj kiuj provizas la muzikon por la "Emerson" estas faritaj de bonkonataj muzikistoj kies vera ludado estas ree aŭdita je ĉiu akcento, frazo kaj delikata esprimnuanco.

Oni povas eviti, laŭvole, la necesecon esprimadi per la piedoj kaj manoj; aŭ se vi volas, la mirinda "Accompano" ebligas ke **vi** regulu la muziktempon kaj esprimadon al via propra kompreno.

Multenhava aro da muziko, speciale taŭga por la "Emerson" Aŭtomata, provizas multegan da ĝuado por ĉiu muzikamanto.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj
Petu katalogon
Fondita 1849

## EMERSON PIANO COMPANY

BOSTON, MASS.